

Th. Kilian,
1-4-36.

Enkondukaj vortoj por la "Aprila Vespero"
de l'Esperantista Klubo en Brno,
disaŭdigata de l'Verda Stacio".

Kun sincera ĝojo mi konstatas la grandan nombron da gesamideanoj kaj gastoj kunvenintaj okaze de nia "Aprila Vespero". Via tiel multnombra ĉeesto estas pravas, ke la intereso pri esperanto en la urbo de l' Verda Stacio estas viva, ĝi pravas, ke plaĉas al vi niaj regulaj monataj vesperoj. Vi ĉiuj estu bonvenintaj! Mi bonvenigas niajn gastojn, kiujn vi venigis al nia vespero, por ke ili vidu kaj propra-orele konvinkiĝu, ke esperanto estas lingvo vivanta kaj ke valoras lerni la lingvon de l' esperantista popolo.

Sed nedireble pli granda estas hodiaŭ la nombro de niaj nevideblaj gastoj. Antaŭ mi staras la miraklo de nia jarcento, la mikrofono. Ĝi estas la orelo de miloj da amikoj dissemintaj tra la tuta kontinento. Ili ĉiuj spirite venis al nia bela urbo Brno, por pasigi kun ni amikan vesperon en rondo familia. Jen simbola gesto, ke homoj de bona volo ĉiam trovas multe pli da komunaj intereso ol da intereso disigaj. Kiel prezidanto de la Esperantista Klubo en Brno mi havas la honoron frate bonvenigi ankaŭ vin, amikoj el ĉiuj landoj, indiferente al kiu raso kaj nacio, religio kaj politika partio vi apartenas.

Lastfine sed ne lastmerite mi bonvenigas kaj samtempe dankas la anojn de l'Verda Stacio, kaj de la grupo Trakt, ~~speciale al ĝia direktoro, samideano inĝeniero Antonín Slavík~~, kaj ĉiujn artistojn kaj samideanojn, kiuj preparis kaj prizorgos la programon de nia "Aprila Vespero".

Karaj gesamideanoj! Ĵus mi sciigis novaĵon, kiu igos pli rapide bati vian esperantistan koron, kiu igos pli rapide pulsi vian esperantistan sangon, kiu signifos novan epokon en la historio de nia esperanta movado. Tiu ĉi novaĵo venis el ~~la du najbaraj ŝtatoj~~ Nederlando kaj Holando. Ni esperantistoj prave fieras pri niaj internaciaj interrilatoj per esperanto, kiu malfermas al ni la tutan mondon. Ni esperantistoj ricevas ekz. de nia leterportisto poŝtkarton, kompreneble bildflanke afrankitan el Japanujo aŭ leteron el Honolulu kaj akceptas ilin kun mieno indiferenta, kvazaŭ ni akceptus la 3-an admonleteron de nia tajloro. Jen kiel efikas la kutimo. Ni esperantistoj interrilatas kun la mondo, ni konas la mondon. Ni esperantistoj ne intermiksas erare Nederlandon kaj Holandon, kaj kiel okazadas ĉe neesperantistoj, kiuj pensas pri Nederlando kaj parolas pri Holando kaj male. Tiu ĉi malagrabra fakto igis pripensi la oficialajn rondojn de l'ambaŭ ŝtatoj, kiel oni povus forigi tiun ĉi bedaŭrindan staton. Jam de longe ili intertraktis - kompreneble tute sekrete - kaj jen la simpla solvo: ambaŭ ŝtatoj hodiaŭ unuiĝis. Estonte do niaj studentoj ne plu devos pene memori, ĉu la mondfama Haarlem kun siaj belegaj tulipoj kaj hiacintoj kuŝas en Nederlando aŭ Holando kaj kiu el ili fabrikas la Eidam-an fromaĝon. Mi havas konaton, kiu veturis Holandon kaj venis Nederlandon. Kaj sian eraron li konstatis nur en la fina stacio de sia vojaĝo. Ho, tre embarasiga situacio por li! Por ke la Holandanoj same kiel la Nederlandanoj povu resti fidelaj al siaj gepatraj lingvoj estis decidite, ke - kaj nun bone atentu - ke esperanto estu la oficiala lingvo de la unuiĝintaj ŝtatoj Holanda-Nederlanda. Jen brila ekzemplo al la tuta mondo! Sed dume la koro de l'esperantistoj ĝojebriiĝas, gravmienas kaj cerbumas niaj teoriemuloj: Kiu formo estas la ĝusta, ĉu "Unuigitaj aŭ unuiĝintaj ŝtatoj de Nederlando kaj Holando".

Tiu ĉi historia decido havos sendube unikan propagandan valoron por nia movado. Kaj sen propagando, sen reklamo povas nuntempe prosperi nek nia movado, nek politika reĝimo nek simpla metiisto. Vi ĉiuj scias, ke per sia efika reklamo fariĝis Baŭa el simpla ŝuisto unu el la plej grandaj ŝufabrikantoj de la mondo. ~~-reklamo, bona kvalito, malaltega prezo, jen liaj tri helpantoj.~~ Cetere la majstroj de l' reklamo estas la Usonanoj. Certe vi jam legis, ke ili ĵetas dumnokte lumreklamon sur la malhelan ĉielon. Ĉapelfabrikanto en Nova Jaro ĵetis ĉielen jenan reklamon: "Charlie Chaplin portas niajn ĉapelojn!" Kaj konkurenca firmo ĵetis ĉielen jenan aldonon: Kaj tial lin ridas la tuta mondo. Baŭa preparas jam de longe vere unikan reklamon. Lia reklamo estas ĉiam tre konciza: la vorto Baŭa kaj super ĝi bela virina ŝueto. Tiun ĉi reklamon li ĵetos hodiaŭ nokte per lumo de tri miliardoj da kandeloj sur la malluman diskon de l'luno. Tiu ĉi unika reklamo estos videbla de ĉiu

loko de l' kontinento de post la 23-24- horo MET. Por ke la moviĝanta luno ne forkuru de la reklamo, ankaŭ la lumĵetilo aŭtomate turniĝos. Ĉio estas detale pripensita, la unika reklamo certe sukcesos. Amikoj, irante hodiaŭ nokte hejmen, ne forgesu rigardi ĉielen!

Kaj nun mi transdonos la parolon al ŝi kaj li. Permesu, ke mi prezentu ilin al vi: ŝi estas aminda belulino fraŭlino Zdenka Švábíková, li estas juna temperamenta sinjoro Ant. Klimeš / Heger. Ludos ĝazbando de Křenovský. Mi petas!